



monda solidareco

N-ro 101 - Marto 2010 - kvaronjara - 1.25 €

Solidareco, spertinda nocio

Kiam oni parolas pri solidareco, oni povas imagi ĝin sub persona formo, rekta, implikita, aŭ sub sennoma formo, nereкта, seninteresa, preskaŭ nepersona.

La unua formo povas esti asociita kun agadoj kiel helpo al sia familio, al malsanulo, al orfo. Ofte en tia okazo estas implikiĝo, kontakto proksima al la ricevanto.

En la alia formo, oni sentas sin malpli implikita aŭ koncernata. Ĉar oni ne havas la kontakton aŭ la proksimecon kun la profitonto de nia solidareco, oni ne ricevas same fortajn emociojn. Oni estas malpli rekta aganto kaj korinkline malpli proksima.

La uzita formo estas afero de elekto, tiu por scii ĉu oni havas tempon kaj emon por ĉeesti kaj rekte agadi aŭ ĉu oni elektas la delegadon de nia agado.

Nia solidareco estu sen subkompreno. Oni ne povas diri al vi, ke vi helpis Ajdan, Petron aŭ Georgon, ĉar ĉe MSM ni ne praktikas personan donacon kaj certe ni ne povas diri, ke viaj kontribuoj profitis al tiu aŭ ĉi tiu grupo da homoj. Tamen, vi sciu, ke viaj kontribuoj estas kiel rivereto kiu kunflue kun la aliaj riveretoj donos sufiĉe da forto por turnigi la padelojn de la aktiveco de grupo foje situanta je granda distanco de la regiono de via rivereto..

Certe nia farmaniero ne ebligas al vi, kiel ĉe aliaj organizaĵoj, "levi la manikojn" kaj rekte partopreni en la surloka realigado de la projektoj, sed ĝi ebligas al vi, ĉar vi ne havas tempon aŭ kapablon por fari tion, konkretigi vian responsecon al solidaraj homoj.

Tamen ni povas certigi al vi, ke tiuj, kiuj vizitis la projektojn financitajn de MSM revenis konvinkitaj.

Kaj kiel pruvo : Claudine Tournier kaj Edwige Geniteau akompanis Christian Trianneau dum vizito en Burkinio en 2008. Surloke ili renkontis globidaranojn, kaj komunikis, interŝanĝis, vidis kaj komprenis la taŭgecon.

La eksperimento fruktodonis ĉar post reveno Claudine Tournier kandidatiĝis kaj estis akceptita en la Administran Konsilantaron en 2008. Nun Edwige Geniteau faris la saman klopodon kaj aliĝis al la Konsilantaro dum la kunveno, kiu okazis en Nouaillé-Maupertuis.

Enhavo

Solidareco, spertinda nocio	p. 1
Burkinumaj renkontoj.....	p. 2—5
La vojoj de Solidareco	p. 6
Eĥoj el la F.A.K.	p. 7
Globidara demando.....	p. 8
La butiko	p. 8
Financoj	p. 8

Alia eksperimenta reciprokeco. Per la veno de kelkaj afrikanoj, interalie en Nouaillé-Maupertuis, la urbestro kaj la municipo povis taksu la realigitan laboron. Tial la komunumo sin devontigis jam de tri jaroj en regula financa partopreno en la projektoj de MSM.

Alia ekzemplo : la burkinio Bakary Ouattara konstatis la seriozan laboron de nia Administra Konsilantaro dum sia veno en Francion, kaj fariĝis post reveno grava aktivulo de MSM en Burkinio.

Nu ! solidareco kiel spertinda nocio ? En tiu numero Edwige Geniteau liveras al ni siajn sentojn. Jen io reala, vera, konkreta, rava.

John De La Cruz

Renkonto kun la grupoj en Burkínio

Membrino de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato, Edwige Geniteau, restadis en Burkínio de la 1a ĝis la 22a de aŭgusto 2009. Kun la konsento de la administrantoj de MSM ŝi renkontis grupojn, kiuj petis financadon de projektoj celantaj la prinutran memsufiĉon.

En Bobodiulaso, Edwige Geniteau estis gvidata kaj veturigata de Bakary Ouattara (responsanto de la Pluzorga Komitato de la grupoj en la Bobodiulasa distrikto, prezidanto de la grupo Koboro), helpata de Yaya Sanou (sekretario de la grupo Koboro). Tiu lasta donis helpon al Bakary dum la veturadoj en savano kaj oficis kiel fotisto.



Edwige Géniteau infanflegistino, klinika fakulino, loĝanta en Nouaillé Maupertuis, apud Poitiers.(Puatiero) Francio

2an de aŭgusto

Vizito al ina grupo Gnongon Deme (tinkturistinoj kaj "bogolan"-faristinoj)

La renkonto okazis en Bobodiulaso, ĉe la prezidantino S-ino Mariam Traoré, kiu venis al ni por gvidi nin ĝis la rendevuejo. 8 membroj el la 19 aliĝintoj ĉeestis el kiuj la sekretario Sanou Bibata, kaj la kasistino S-ino Oueresse Sawadogo Rasmata.

Mariam eksplikis al ni la teknikon de « bogolan » (uzataj materialoj : koto el la valfundoj, pigmentoj) sekvita de demonstrado.

Tiu grupo petis mikrokrediton por la aĉeto de stebmaŝino. La kontrakto estis surloke subskribita.



Saman tagon, renkonto kun la Ina grupo SABABOUGNOUMAN (fabrikado de lesivsapo) en la Bobodiulasa sektoro 10, ĉe la hejmo de la prezidantino.



7 inoj el la 10 membroj ĉeestis la rendevuon, interalie la prezidantino S-ino Traoré-Konaté Bibiane, la sekretario S-ino Traoré Makoura, la adjunkta kasistino S-ino Ouattara Christine ; la kasistino senkulpiĝis.

Mikrokredito por fabriki tualetsapon estas petita de MSM.. La uzataj ingrediencoj estas aliaj ol tiuj uzataj por la lesivsapo. Klerigo fare de teknikistoj estas necesa. Tiu mikrokredito estas atribuita kaj la kontrakto subskribita tiokaze.



Ni revenis marde la 18an de aŭgusto, invititaj por asisti al diversaj stadioj de la fabrikado de sapo. La nuna fabrikado estas permana. La sapfaristinoj planas aĉeti materialon tian, kia markpremaŝino.



Akompanataj de Mariam Traore, ni daŭrigas la interŝanĝojn en tiu sama sektoro, irante al la helpo de la prezidantino de la asocio SOLIDARECO (la konsento datiĝas de 2004)). La virinoj ekkonis la ekziston de MSM. 7 inter ili el la 15 membroj deziras aliĝi. La prezidantino S-ino Konaté, denaske Traoré Mariam, la sekretariino S-ino Maïga, la kasistino S-ino Traoré denaske Traoré Rodiatou, S-rino Diarra denaske Sessouma, S-ino Koné Djeneba, S-rino Traoré Adjaratou. Ankaŭ la edzo de la prezidantino ĉeestis, li intervenas kiel konsilanto sine de la grupo.



Iliaj aktivecoj estas ĉefe la fabrikado de tualelsapo, fruktosuko, konfitaĵoj, siropoj, sekigitaj mangoj).

Informadoj pri la funkciado de MSM estis donitaj. Oni atentigis pri la atendotempo kaj la kondiĉoj por ricevi prunton. Por eviti trorapidemon por decidi, ne definitiva tempo de pripensado estis proponita. Poste S-ino Konate vizitigis al ni la magazenen, kie estas stokita la materialo por fabriki la produktojn.

La 15an de aŭgusto : vizito al la grupo Benkadi de PEFOUROU-3:

Post duhora vojaĝo kaj kelkaj malfacilaĵoj por veturi sur teroj en tiu pluvsezono (enŝlimiĝinta veturilo), ni enveturigis la prezidanton S-ro Sanou Moussie, kiu venis por atendi nin en Barre por gvidi nin ĝis la bieno.



Surloke staris 6 vilaĝanoj el la 10 membroj, kiuj konsistigas la grupon, el kiuj la sekretario, la kasisto. Ili petis financon de projekto de tirbesta agrokultivo. Ĉiu membro deziras akiri unu bovparon. Ili ankaŭ informis nin pri la manko de ilaro tia kiaj plugiloj kaj pioĉetoj por la prilaborado de la terenoj kaj la sarkado.



La 19an de aŭgusto : vizito al la ina grupo Sinignassigui en la vilaĝo Dodugu.

Ni jam rekontis la membrojn de tiu grupo komence de mia restado, ĉar mi decidis festi mian naskiĝdaton en la vilaĝo.




Por tiu ĝoja okazo ili antaŭvidis konfekcii al si novajn vestojn. Ni do iris al Kajatu la 6an de aŭgusto, kune kun la tajloro.

Ni revenis al Dodugu la 11an de aŭgusto por pasigi la tagon kun la vilaĝanoj. Je la programo : manĝo donacita al la vilaĝanoj el rizo kun kapridaĵo kaj kokidaĵo, la tuto kun diversaj trinkaĵoj : biero, koka-kolao, limonado kaj por kelkaj « *dolo* » (milivino). Muziko per balafonoj kaj tamtamoj invitis la virinojn senlace danci.



Tiu varmkora etoso tuŝis la virojn, kiu lasis sin ekdanci laŭ « diablaj » ritmoj apud la inoj. La tradicia vilaĝestro estis tre aktiva por tiu spektaklo, same kiel la administra estro kiu ankaŭ respondis al la invito per sia ĉeesto.

Post tiu memorinda tago, ni revidis nin la 19an de aŭgusto. Post dankoj kaj benoj, ni pasis al la subskribo de la kontrakto de pruntodono (mikrokredito por la produkto de karitea butero) fare de la prezidantino, la sekretariino S-ino Sanoute, la kasistino S-ino Sanou Maimouna.



Ni ne pensis pri la inko necesa por la subskribo per fingraj markoj, ni improvizis per la suko de radikoj de sovaĝa planto.

La 20an de aŭgusto

Renkonto kun la sekretario S-ro Traore Fabe kaj membro de la grupo Moĝibeĝi en Samogohiri



Alveno en Bobodiulason post longa veturado per motorciklo. Financado estis petita por la konstruado de vartenejo por prinutra rezervo.



Kaj kun la sekretario de la grupo Yankadi en Padema, situanta je 75 km de Bobodiulaso.

S-ro Sanou Brahima Nama, membro de la Pluzorga Komitato venis en

Bobodiulason por renkonti membron de MSM, ĉar ĝis tiam neniu el MSM iris al ili. Ilia projekto, kiu datiĝas de 2003, konsistis en la konstruado de vartenejo. S-ro Sanou parolis ankaŭ pri la kazo de la ina grupo Toyow, kiu atendas la financadon de sia projekto (transformado de plukitaj produktoj).



Vizito al la grupo Sabarikadi kaj Benkadi en Sarfalo

Pro la pluvsezono ("vintruma periodo") ne ĉiuj membroj povis dediĉi tempon, ĉar ili estis okupataj por la kultivlaboroj. Ĉeestas por akcepti nin la prezidanto S-ro Ilboudo Iwaogo, la vic-prezidanto S-ro Sanou Amidou, la sekretario S-ro Konate Adma, la kasisto S-ro Demè Foussemi kaj 2 aliaj membroj.

El la ina grupo Benkadi, la prezidantino S-ino Deme Mema, la sekretariino S-ino Coulibaly Mamou, la kasistino S-ino Sanou Djouma kaj S-inoj Boni Pascaline, Palcouliga Lamoussa, Yeressana Adjara. La ricevo de la mikrokredito por Sabarikadi kaj Benkadi estas konfirmita. Ni subskribas la pruntajn kontraktojn.

En Vagaduguo

Vizito tuj post mia alveno de Symphorien Meda, **responsanto de la Pluzorga Komitato de la distrikto de Vagaduguo** je mia forirtago (22an de aŭgusto). Li donas al mi dokumentojn por Christian Trianneau, administranto de MSM por Burkinio.



Tiu mergiĝo en la vivo de la burkinioj estis reala konsciĝo pri la stato de malriĉeco koncerne la nutradon, la sanon, la lernadon, sed de valora riĉeco de hejmo, konkretiĝanta per solidareca spirito.

**Dankon al ĉiuj, kiujn mi retrovis en Vagaduguo kaj en Bobodiulaso,
al tiuj, kun kiuj mi konatiĝis
kaj kiuj subtenis min en tiu homa aventuro,
al la vilaĝanoj, kiuj elkore premis mian manon
kaj al ĉiuj, kiujn mi renkontis sur la tervoj, sur la stratoj kaj aliloke !**

Edwige Geniteau

La vojoj de la solidareco



... pasas tra Burkinio

Gnoulalon :

Tiu ina grupo en la distrikto de Vagaduguo brile regis sian projekton de produktado kaj de komercigo de freŝaj fruktosukoj, ĉar ili ĵus finis la repagon de la prunto, kiun Monda Solidareco kontraŭ la Malsato disponigis al ili. Gratulon al tiuj inoj, kiuj honoris la ricevitajn solidarecon kaj kiuj tiamaniere igis ĝin ebla por aliaj.



Justica proceduro kontraŭ la NRO AKAP (Asocio por la Kampara Asimilita Progreso "ADRI") kaj ties responsanto Dramane TRAORE.

Pro nerespondo de tiu burkina NRO, kiu reprezentis Mondan Solidarecon kontraŭ la Malsato en Burkinio kaj pro plendoj de pluraj vilaĝaj grupoj, kiuj sciigis, ke ili ne ricevis la tutan aŭ parton de la financadoj senditaj de MSM, la Federacia Administra Konsilantaro de MSM elektis advokatan oficejon en Bobodiulaso por proceduri kontraŭ la NRO AKAP kaj ricevi justicon de tiuj deturnitaj monsumoj kaj destinitaj al burkinioj kun modestaj enspezoj... La grupoj de la distrikto estas invitataj ne plu pagi siajn kotizojn ĉe Dramane Traoré kaj ekribli per poŝto kun la administranto Christian Trianneau, 15 rue du Pré Ventenet, 86340 Nouaillé Maupertuis, Francio.

Forpaso ;

S-ino Sano Sogoda, membro de la ina grupo Sinignassigui en Dodugu, kaj edzino de la adjunkta kasisto de la grupo Koboro forpasis la 25an de januaro 2010 en sia 49a jaro post mallonga malsano. La Administra Konsilantaro de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato kondolencas al ŝia familio kaj al la grupoj.



... tra Senegalio:

GIE de la helpantaj bestkuracistoj :

La prezidanto de tiu grupo S-ro Sow estis maltrankvila por korespondi kun la membroj de la Administra Konsilantaro, ĉar li parolas nur la Pulan lingvon. Dank'al la Senegala kadranta NRO ADID (Asocio por Disvolviĝo Integrita kaj Daŭra), partnero de MSM, kaj de ties reganto Thiayedia N'Diaye, tiu Grupo kun Intereso Ekonomia povis komuniki en franca sian projekton kaj siajn agadmotivojn. Dum la kunsido de 28a de februaro 2010 la financado de tiu bredprojekto estis decidita de la Administra Konsilantaro. Tamen pro la kalendaro de la projektoj jam atendantaj la financadon, kaj enkalkule de la kotizoj ricevotaj, tiu financado okazos nur fine de 2011 ...



Teddungal Sippobé :

Tiu ina grupo praktikas diversajn aktivecojn : tinkurado, mikrokredito, bredado de ŝafoj kaj de bovoj, kaj repagas ĉiun jaron la prunton donitan de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato.



... tra Eburio:

La ina grupo Sinignanssigui en Torla kaj la vira grupo Djiguya en Torla produktas rizon kaj maizon. Ili estas membroj de MSM jam de multaj jaroj. Nun ili profitas de mikrokredito, kiujn ili penas por repagi, ĉar la 100 kg sako da maizo ne estas vendata, kiel esperite, por 12 000 F CFA en februaro 2010 sed nur por 8 500 F CFA ...



... kaj tra Haitio

Post la terura sismo, kiu funebrigis la landon la Federacia Administra Konsilantaro petas siajn membrojn ariĝi ĉe la korespondanto de MSM, S-ro Michelet MICHEL, por studi kaj ellabori la plej bonan strategion de solidareco inter ili kaj kun la haitia loĝantaro.



5an kaj 6an de decembro 2009

La municipo de **Nouaille-Maupertuis** estis konvinkita pro la reciprokeca klopodado antaŭenpuŝata de MSM. Por ankoraŭ pli marki tiun sindevontigon kun ni, ĝi oficiale nomis "**Ĉambro de la Solidareco**" la kunvenĉambron, kiu triafoje akceptis la kunvenon de nia Administra Konsilantaro.

La municipo de Nouaille-Maupertuis jam konsentis al MSM plurajn subvenciojn relative gravajn, kiuj ebligis plifruigi la komenciĝon de projektoj interalie en Burkinio : dum la jaroj Dramane Traore, Ouattara Bakary, Bayo Fode povis konstati la varmecon de la akcepto farita de la urbestro S-ro Henri Bosc.

La problemoj traktitaj dum tiu kunsido de la Administra Konsilantaro longe koncernis la **situacion en Burkinio**. Post la emeritiĝo de sia Plenuma Direktoro, AKAP ne plu estas korekte regata. Nun konflikto ekzistas inter AKAP kaj MSM. Feliĉe la Pluzorga Komitato en Bobodiulaso plikonsistiĝis kaj troviĝas preta por plenumi la kunlaboradon de la grupoj inter ili kaj fariĝi la ligilo kun la Administra Konsilantaro. Sekvinde !

Ankaŭ sekvindos, dum estonta kunsido, la evoluo de niaj rilatoj kun la grupoj en Benino.

Balotelektoj en Afriko.

La mandato de la Regionaj Delegitoj elektitaj en 2004 kadukiĝos en 2010. Novaj balotelektoj devas esti organizitaj. Alvoko al kandidatiĝoj estos lanĉita aldone al la bulteno n-ro 102.

Nova Administrantino :

Edwige Geniteau, kiu vojaĝis kun la misio de MSM en Burkinio en 2008, kaj kiu reiris en 2009 (Vd en tiu bulteno) kandidatiĝis por partopreni en la Administra Konsilantaro de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato. Unuvoĉa prikonsento.

La dosieroj :

18 dosieroj kuŝis en la tagordo. La Administra Konsilantaro voĉdonis por konstati la elekteblecon de la projekto de grenmuelado de la ina grupo Sinignassigui, en Dodugu (Burkinio).

Neniu nova projekto estas deklarita financebla.

Financadoj

Du mikrokreditoj de 600 Eŭroj estis atribuitaj al la grupoj Yancadi kaj Toyow en Padema (Burkinio), duone kunfinancitaj de la asocio de la Mondcivitanoj en Puatuo-Ĉarentoj (Francio)

La grupo Moĝibeĝi en Samogohiri (Burkinio) ricevos sian duan financparton por la finkonstruado kaj la ekfunkciado de la vartenejo por prinutra rezervo ("grenbanko").

Debatoj kaj Strategio

Terenaj problemoj:

Ni nun konstatas novan koloniadon de la terenoj, interalie en tropika Afriko kaj en Malagasio. La terenoj estas aĉetitaj aŭ de transnaciaj societoj, aŭ de komisiitoj laborantaj por la intereso de ŝtatoj (interalie Ĉinio). Unu aŭ pluraj artikoloj pritraktos tiun temon en proksima Monda Solidareco.

Monda Institucio de Homaj Rajtoj. Temas pri projekto zorgata de la Konsultiĝa Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj (ASKOP) de post la sesio de Braziljo (majo 2009). Esplorkomisiono konsistiĝas por labori en tiu senco. MSM partoprenos en ĝi, interalie dum la Monda Forumo de Homaj Rajtoj en Nantes, fine de junio 2010.

Daniel Durand

Ĉu mi rajtas komuniki rekte kun la Administra Konsilantaro ?

Jes !



Ĉiuj membroj de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato rajtas rekte komuniki kun ĉiu alia membro de nia asocio, kiu ajn estas la rolo aŭ la respondeco. Ni konsistigas komunumon fonditan sur demokratio. Do estas **libereco de esprimo, libereco de komunikado**.

Ĉu per poŝta letero, elektronika mesaĝo, telefono, SMS, per partopreno en elektronikaj forumoj internaj al Monda Solidareco kontraŭ la Malsato, aŭ eksteraj (interretaj taglibroj, forumoj de ASKOP aŭ aliaj), ĉu dum kunvenoj ĉu pere de nia ŝatata interligilo Monda Solidareco, ĉio devas esti aranĝata por ke la spertoj kaj la demandoj de iuj pliriĉigu la aliajn.

Tiu principo aplikiĝas ankaŭ al la membroj de la grupoj aŭ lokaj asocioj de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato, ĉu ili estas kadrataj de NRO, kunordigataj de Pluzorga komitato ĉu ne. Libereco de komunikado – respekto de la homoj kaj de ties sindevontigoj – solidareco inter ĉiuj.

Globidar



La Butiko

T-ĉemizoj el blanka kotono kun blua emblemato, laŭ mezuroj S, M, L, XL, estas vendataj por 7 € per korespondo (por Eŭropanoj)
Globkrajonoj kun emblemato estas vendataj por 1 €

Restas ankoraŭ ĉemizetoj kaj trikotĉemizoj kun la historia logo « Monda Fonduso de Solidareco kontraŭ la Malsato (vd. ĉi-sube).

Ekster Eŭropo, kontaktu vian administranton .



monda solidareco

Estas bulteno eldonata de **Monda Solidareco kontraŭ la Malsato**

JE VIA DISPONO :

- Ø Aliĝiloj
- Ø Flugfolioj pri projektoj
- Ø Pliajn bultenojn
- Ø Federacia Reglamente de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato
- Ø Afiŝetoj (A3-formato)

Nur por Eŭropo :

- Ø Blankaj ĉemizetoj : 17 € - trikotĉemizoj 12 € kun la emblemato « *Fonds Mondial* ».
- Ø Kovertoj DL (11 cm x 22 cm) « *Solidarité Mondiale contre la Faim* » + emblemato : 6 € por 100
- Ø Fotoj paperaj aŭ elektronikaj.

Ne forgesu la afrankon : + 3 €

KOTIZOJ - DONACOJ - ABONOJ - MENDOJ : **Kiel pagi ?**

Äper franca ĉeko al **Globidar**

Äper poŝtaj rimedoj, je la nomo de :
SMF- MONDA SOLIDARECO
(PĈK-CCP PARIS 10.734.96 Z)
RIP:
FR21 2004 1000 0110 7349 6202 056

Äper banka karto aŭ **PayPal** tra la retejo

Ä ankaŭ per monbiletoj enŝovitaj en ordinaran koverton.

ÄFEL kaj UEA kontoj : **mfsk-g**

Librotenado je la sama adreso kiel la bulteno

Sur la adresetikedo de la koverto aperas la proksimuma dato de via lasta financa partopreno.

RICEVITAJ KOTIZOJ kaj DONACOJ

septembro 2009 : 1 388 €
oktobro 2009: 1 154 €
novembro 2009 : 2 719 €
decembro .2009 : 3 016 €

MONDA SOLIDARECO estas eldonita en Esperanto, kaj franca lingvo.

Jara abono : 5 €

Fotoj el la fototeko de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato **Desegnoj** : Yamsina Sahraoui
Elfrancisigis Daniel Durand,
Ne-kontrolita lingvo

Directeur de la publication : Daniel Durand
CPPAP n° 0410 G 86482.
Imprimerie de l'association.
Tel : +33 (0)241 78 47 75

info@globidar.org
www.globidar.org

MONDA SOLIDARECO
Les Nids
FR 49190 St-AUBIN-DE-LUIGNE
Francio